

## AVENO #45 - Ekologio kaj Ekonomio - 2019

2020 Bonan Novan Jaron !

Nova informejo: kern.punkto.info/arkivo/

= =

= =

2019-12-18 Necesas imposto por aviadila benzino (kerozeno) – EU-civitanoj bonvolu subskribi !

ĉar flugi per aviadilo estas relative malmultekosta, ĉiam pli kaj pli flugas – kaj la eligata CO2 plihejtigas nian klimaton :(

Jen la retejo de la Europa Civitana Iniciativo – do, subskribi validas nur por civitanoj de EU-shtatoj.

Sed la temo estas tutmonda – vi povas elekti el ĉiuj oficialaj EU-lingvoj:

[www.endingaviationfueltaxexemption.eu/?page\\_id=725&lang=de](http://www.endingaviationfueltaxexemption.eu/?page_id=725&lang=de)

--

2019-12-12 Monsanto fraude kaj kashe uzas mem-pagitajn esplorojn privata germana „Institut fuer Agro Business (IAB)“ de iu germana profesoro luis chambrojn de la universitato Gießen kaj tiamaniere pretendis ke temas pri neutrala esplor-instituto. Tiu profesoro kalkulis la (grandajn) ekonomiajn perdojn se kamparanoj ne plu rajtas uzi Glifosaton. Li diris ke li ne estis pagita de Monsanto. Fakte poste Bayer AG konfirmis ke ja temas pri pagita esploro de Monsanto.

Dank' al la esploroj de [www.Lobbycontrol.de](http://www.Lobbycontrol.de) ni nun scias tion. Lau informoj de

[www.lobbycontrol.de](http://www.lobbycontrol.de)

Badische Zeitung, 2019-12-18, p.19, informis ke oni uzis en Germanio dum 2018 estis 3450 tunoj da Glifosato, tio estis 25% malpli ol dum 2017.

= =

2019-12-11 La Verda Interkonsento "Green Deal" de la Eŭropa Komisiono estas tute netaŭga.

La prezidantino de EU Komisiono von der Leyen prezentis sian Verdajn Interkonsenton kun grandaj vortoj. La plano prezentita hieraŭ ne sufiĉas. Ambaŭ celoj ne sufiĉas, kaj multaj subtenaj rimedoj de la fosilio-nuklea ekonomio, precipe iliaj altaj subvencioj, persistas. Komentoj pri la celoj: EU fariĝu karbona neŭtrala post 2050 post la Verda Interkonsento.

Tio signifas, ke antaŭ 2050 EU bilanco eĉ elsendos grandegajn kvantojn da forcejaj gasoj en tergloban atmosferon, kiu je 408 ppm da CO2 jam reprezentas 147% kaj je pli ol 1.869 ppm da metano, do 259% super la antaŭ-industria nivelo. Ajna nova emisio al la atmosfero estas senrespondeca, ĉar ĝi plue pliigos koncentriĝojn de forcejaj gasoj kaj pliigos la jaran energion de tutmonda varmiĝo.

Sed eĉ klimat-neŭtrala ankoraŭ ne signifas nulo-emisiojn, ĉar multaj pliaj eligoj/emisioj estos ankoraŭ permesataj post 2050, kiuj tiam estos kompensataj per rearbarigoj aŭ eĉ pere de emisio-atestiloj el aliaj kontinentoj. Petrolo, tergaso kaj karbo, kaj aparte nuklea energio, estos parto de la energia sistemo verŝajne eĉ post 2050. Ĉi tio ankaŭ evidentigas, ke altigo de la neadekvataj EU-celoj por renovigeblaj energioj ne estas eksplicite provizata en la Verda Interkonsento, kaj ankaŭ ne temas pri 100% renovigeblaj energioj. La tuta afero, kvankam hodiaŭ renovigeblaj energioj estas la

plej malmultekosta maniero produkti elektron, kaj tiel teni sin al fosilia aŭ atoma energio, estas ekonomia ŝarĝo. Jam pli ol 60 nacioj kaj miloj da urboj deklaris la celon de 100% renovigeblaj energioj, EU ne sekvas.

De ambicia klimato-rotekta celo, la Verda Interkonsento estas tre malproksima. Ne estas postuloj pri redukto de fosiliaj kaj atomaj subvencioj. De 2020, pliaj 100 miliardoj da eŭroj el la propraj fondusoj de impostpagantoj kaj la propraj financoj de la Eŭropa Invest-Banko devas flui por justa, daŭripova kaj verda disvolvigo de la membroŝtatoj. La Komisiono rimarkas en ĉi tiu Verda Interkonsento, ke necesos ĉiujare sumo de 260 miliardoj da eŭroj por plenumi la aktualajn celojn pri 2030 pri klimato kaj energio.

La Verda Interkonsento prezentita de la prezidanto von der Leyen estas neniel ambicia. La malsukceso tuxi la altajn nivelojn de malutilaj fosiliaj kaj nukleaj subvencioj, la manko de 100% renovigebla energi-celo kaj la daŭrigo de agrikulturaj venenoj je iomete reduktita nivelo anstataux plenskala organika terkultivado estas ŝlosilaj aferoj, kiuj montras la Verdajn Interkonsenton kiel tute netaŭgan.

Teksto de Hans-Josef Fell, Hammelburg (Germanio), 2019-12-12

iomete reduktita kaj tradukita de Manfred Westermayer, AVE

Jen kelkaj ligoj al la fontoj (parte el la teksto), tiuj de Europa Komisiono estas trovebla en ĉiuj oficialaj lingvoj de EU:

<https://www.euractiv.de/section/energie-und-umwelt/news/die-wichtigsten-punkte-des-neuen-green-deal/>

[http://ane4bf-datap1.s3-eu-west-1.amazonaws.com/wmocms/s3fs-public/ckeditor/files/GHG-Bulletin-15\\_en.pdf?mQP5SDxBr\\_pHsQNJsAPrF8E5XnqkfHo2](http://ane4bf-datap1.s3-eu-west-1.amazonaws.com/wmocms/s3fs-public/ckeditor/files/GHG-Bulletin-15_en.pdf?mQP5SDxBr_pHsQNJsAPrF8E5XnqkfHo2)

[https://ec.europa.eu/info/sites/info/files/european-green-deal-communication\\_en.pdf](https://ec.europa.eu/info/sites/info/files/european-green-deal-communication_en.pdf)

(vi povas elekti unu el la oficialaj EU-lingvoj): [https://ec.europa.eu/info/strategy/priorities-2019-2024/european-green-deal\\_de](https://ec.europa.eu/info/strategy/priorities-2019-2024/european-green-deal_de)

[https://www.ren21.net/wp-content/uploads/2019/05/gsr\\_2019\\_full\\_report\\_en.pdf](https://www.ren21.net/wp-content/uploads/2019/05/gsr_2019_full_report_en.pdf)

[https://www.europarl.europa.eu/RegData/etudes/ATAG/2019/644205/EPRS\\_ATA\(2019\)644205\\_EN.pdf](https://www.europarl.europa.eu/RegData/etudes/ATAG/2019/644205/EPRS_ATA(2019)644205_EN.pdf)

Aktuale pri COP25, (de kaj en): <https://www.pik-potsdam.de/aktuelles/pressemitteilungen/forschung-an-cop25-zehn-dinge-die-klima-verhandler-wissen-muessen>

kaj

pri nerenverseblaj okazajhoj (de: Kippelemente, en: tipping points ):

<https://www.pik-potsdam.de/services/infothek/kippelemente>

Rimarko: ĉar kelkaj ret-adresoj malakceptas aktivajn ligilojn, mi ne uzis tiajn.

= =

2019-09-15 Rearbarigo tutmonde – Chinio, Etiopio, ...

Scienca esploro montris ke grandskala rearbarigo povas redukti la klimato-shanghighon,

sed ne sufichas por halti ghin.

Tamen rearbarigo mildigos regionajn klimatojn. Arbaroj tenas la akvon en la regiono. En la zono de Sahel utilas flegi la memstaran re-kreskon el la radikoj, tiel ke oni lasu unu tigon el kiu povas ighi nova arbo. Eblas agrikulturo sub kaj chirkaŭ la arboj, sed tie grandaj plugiloj kaj rikolto-mashinoj ne taugas.

Sed plej-grave estas protekti la nunajn arbarojn kaj ne forbruligi ilin, por poste fari agrikulturon (por sojo, palmoleo, ...) au pashtejojn por bovinoj.

Alia metodo estas uzi denove lignon por konstruajhoj. Jan nun oni konstruis plurajn plur-etaghajn domojn plejparte el ligno – escepte oni metas betonan konstruajhon por la shtuparo kaj lifto, kaj chirkaŭe konstruas uzante lignajn trabojn. Ankaŭ por izolado eblas uzi fibrojn el ligno. Tiamaniere oni tenas la kolektitan CO2 en la materialo.

Multaj civitanoj en Etiopio plantis miliardon da arboj.

P.R.Chinio replantas grandskale la t.n. „Verdan Muron“ por protekti kontraŭ plia dezertigo.

Jen prelego en la germana:

[www.deutschlandfunk.de/waldwunschdenken-kann-aufforstung-das-klima-retten.740.de.html?dram:article\\_id=458726](http://www.deutschlandfunk.de/waldwunschdenken-kann-aufforstung-das-klima-retten.740.de.html?dram:article_id=458726)

Kaj jen ligo al Forsto-Instituto de EU (angle): [www.efi.int/](http://www.efi.int/)

Ankaŭ en Esperanto vi trovas multajn informojn en Vikipedio: [eo.wikipedia.org/wiki/Arbaro](http://eo.wikipedia.org/wiki/Arbaro) - au rearbarigo, agroforstado

2019-09-03 alternativo kontraŭ „fajro-purigado“

post la lasta AVENO venis kelkaj komentoj.

Manfred: Estas delonge farita metodo bruligi la gresojn, ankaŭ de indighenoj por (pli facile) prepari la grundon por kulturi, ĉar la cindro donas rapide la mineralojn. Fari komposton surloke, kiu plialtigus la humozan tavolon, bezonas pli da tempo kaj da laboro.

En la plubarbaro oni trovis multe da ligno-karbo en la grundo, kaj intertempe eksciis ke tio estas valora por plibonigi la maldikan tavolon da humuso (ekz-e en Amazonio). La lignokarbo adsorbas akvon kaj mineralojn kiuj tiamaniere restas atingeblaj de la plantoj.

Alia afero (krima) estas je la homfaritaj bruligoj kiam oni volas formeti la arbaron entute - kion celas tiuj grand-bieniston au spekulantoj (en Grekio, ...). Kompreneble, se ĉio estas seka chirkaŭe, tiaj „planitaj“ farjoj povas ampleksighi ghis katastrofo.

Jen informo de Leo:

Mi konsentas pri tio, ke la cindroj enhavas mineralojn utilajn por poacoj (gresoj kaj grenoj, k.s.). Sed parto de tiuj cindroj estas forportataj de la vento aŭ pluvo, do perdiĝas por la loka flaŭro. Kiam la plantoj mortas surloke, la mineraloj preskaŭ 100%e restas surloke. Mi supozas, ke la diferenco inter ambaŭ rezultigas alian lokan flaŭron.

Laŭ la dokumentaroj, kiun mi vidis pri afrikaj kutimoj, oni bruligas kampojn por eviti, ke arbustoj kaj arboj ekkresku sur la kampoj. Pli junaĝe mi estis konservisto de eta naturrezervejo. Ĉiujare ni kunvenis kun konservistoj de aliaj naturrezervejoj. Regata bruligo estas praktikata ankaŭ en belgaj erikejoj por konservi ilin. Se oni lasas la naturon evolui, oni perdas la specialan flaŭron de tiuj ejoj. Krome (kaj tio tamen okazis antaŭ kelkaj jaroj) estas risko de nekontroleblaj incendioj pro naturaj kaŭzoj (ekzemple fulmo) aŭ malprudenta konduto de vizitantoj (fumado, kuirado) sur sekegaj terenoj.

La lokaj konservistoj rakontis, ke erikejoj precipe ekestis sur ne tre mineralriĉaj (sablecaj) grundoj, kie la kampoj paŝtis siajn ŝafojn kaj rikoltis la herbojn por uzi ilin en la staloj.

Tiel la urino kaj fekaĵo de la brutoj faris el ili taŭgan sterkaĵon por iliaj kampoj. Farante tiel, ili fakte forprenis mineralojn el la erikejoj, kaj tiel kaŭzis, ke nur tre specialigitaj plantoj sukcesas postvivi tie.

Sur "riĉaj" (sterkitaj) grundoj kreskas malmultaj specioj (ekzemple urtikoj, sambukoj, konvolvuloj) sed tre grandkvante. Sur "malriĉaj" grundoj kreskas multaj malsamaj specioj, sed malgrandkvante. Kutime ĉi tie konservistoj provas forigi nitratojn kaj fosfatojn el (parto) de la terenoj. Tia mastrumo postulas jarojn da falĉado kaj forigado de la falĉaĵo....

*Alternativo* estus enterigi (*nebezonatajn*) arbojn. La ligno iĝas spongeca kaj tenas la akvon. Tio estas principo uzata en "Permakultur" (Permaculture en la franca; oni povus traduki tion per "daŭrigebla kultivado"). Kompreneble estas krimo detrui neanstataŭigeblajn praarbarojn!

= =

2019-08-27 brulantaj arbaroj

Necesas distingi inter naturaj fajroj kaj hom-faritaj. La naturaj okazas en diversaj regionoj, kaj ili kutime nur rilatas la gresojn kaj malaltajn arbustojn – tie ili utilas por nutri la grundon per sia cindro.

La homfaritaj kiel nuntempe en Brasilo, Siberio kaj eble ankaŭ en Madagaskaro, k.t.p. Ili estas akompanataj de arbo-faligadoj por havi terenojn por nutri bovinojn au kultivi sojofabojn au simile. Same malbonas faligi arbojn por produkti ligno-karbon en regiono kie neniu zorgas pri la re-arbarigo. Kiam la densa arbaro estas for, perdighas ties efiko teni la humidecon kaj transporti ghin al pli foraj de la maro terenoj. Detruighadas la fekunda grundo – ofte estas nur malprofunda tavolo – pro la sun-radiado, kaj pli poste erozio pro pluvoj au sablo-uraganoj.

Aktuala informo el Siberio:

Komento AVE/mw:

Se Bolsonaro nun diras ke li pretas estingi la fajrojn – tio ne estas pli ol larmoj de krokodilo (post la manghego); la dezirata efiko – senarbarigi grandajn terenojn - jam okazis. Mi timas ke Amazonio ighos simile al Saharo kaj Sahelo.

En Europo oni lernis antaŭ 200 jaroj ke home uzata arbaro bezonas konstantan re-arbarigon.

Alia problemo en Amazonio estas ke kun la arbaro malaperas la indighenaj komunumoj, sovaghaj bestoj, bestetoj kaj multaj ne-konataj plantoj (kiuj iam povus esti utilaj kiel medicino).

Jen la tutmonda asocio pri monitorado de arbaraj fajroj: [www.gfmc.online/](http://www.gfmc.online/)

J.G. Goldammer, specialisto pri arbaraj fajroj: [www.tagesschau.de/ausland/braende-brasilien-interview-101.html](http://www.tagesschau.de/ausland/braende-brasilien-interview-101.html)

= =

2019-08-08 IPCC raportas pri klimata efiko de agrikulturo

la aktuala raporto montas ke la temperaturo sur grundo jam altighis en tutmonda averagho al 1,4 °C; mara surfaco altighis je 0,9 °C. Unu el al gravaj temo estas la land-kulturado, kiu unuflanke influas la klimaton per forhakado da arbaroj kaj sekigo de marĉoj kio altigas CO2 en la aero; krome per la forcej-efikaj gasoj (metano, CH4 kaj N2O) kiuj elighas de bovinoj, de rizo-kampoj k.t.p., aliflanke agrikulturo estas tre afliktita de la klimataj ekstremoj: sekeco, inundo kaj ventegoj. La industrieca agrikultura produktado produktas problemojn: konsumo da akvo, poluado per pesticidoj, redukto de la humusa tavolo. Aliflanke ni konsumantoj devus manghi malpli da viando, kaj aĉeti pli nature (organike)

produktitaj nutraĵoj. La politiko devas instigi la agrikulturon per subvenciado laŭ daurigebla kvalito en ĉiuj sferoj, kaj ne laŭ la areo, kiun nuntempe plejparte okazas ekz-e en EU.

(laŭ IPCC – en la 6 lingvoj de UN: [www.ipcc.ch/report/srccl/](http://www.ipcc.ch/report/srccl/) )

--

2019-08-07 SEKEM – egipta miraklo per Demeter-spertoj sub permeso de la egipta prezidento Sadat komencighis la Sekem-agrikulturo en Egipto. Dank al la principoj de Demeter Ibrahim Abouleish sukcesis evolui agrikulturan oazon sur dezerta grundo. Oni ne bruligas organikajn defalajhojn sed produktas komposton, kiu plifekundigas la grundon kaj pli bone retenas la akvon. Laŭ la antroposofiaj principoj de Rudolf Steiner ili ankaŭ edukas infanojn, kaj instruas diversajn metiojn. Tiele estighis tuta reto da firmaoj. Nun ili fondis novan bienon 300 km sude de Kairo.

(laŭ informo de [wikipedia.org](http://wikipedia.org), kaj nun en la germana: [www.tagesschau.de/ausland/sekem-landwirtschaft-aegypten-101.html](http://www.tagesschau.de/ausland/sekem-landwirtschaft-aegypten-101.html) )

--

2019-07 Agroforstado en Burundo

la germana partnerlando Baden-Virtembergo subtenas (per 185 mil Euro) sciencan kunlaboron pri la rearbarigo en Burundo. Kunlaboras forsta altlernejo en Rottenburg, Naturland, Justa komerco, kaj en Burundo kunlaboras profesoro pri forsto, kaj la kooperativo pri kafo COCOCA.

Mi scias ke rearbarigo estas unu el la plej gravaj temoj en Burundo, por eviti erozion, kaj havi stabilan tavolon da grundakvo. Fakte temas pri agro-forstado: tio signifas, havi kelkajn malnovajn grandajn arbojn, kiuj daŭre protektas la grundon kaj donas ombron. Sub ili povas esti malpli altaj frukt-arboj aŭ plantoj por kafo aŭ kakao, kaj je la grundo eblas planti fabojn kaj aliajn legomojn. Krom legomoj kaj kafo tiu arbaro ankaŭ donas lignon por konstrui kaj por kuiri.

(laŭ: [www.sez.de/neuigkeiten/land-unterst%C3%BCtzt-agroforstprojekt-in-burundi](http://www.sez.de/neuigkeiten/land-unterst%C3%BCtzt-agroforstprojekt-in-burundi) )

--

2019-08 Amazonio – giganta forhakado da arbaroj

la brazila prezidento evidente tute neglektas la intereson de la indigenaj grupoj kiuj vivas en la pluarbaro de Amazonio kaj uzas la naturon laŭ daurigebla maniero. Dank al satelita monitorado scienculoj malkovris ke ene de Julio 2019 estis forhakita aŭ segita 1864 km<sup>2</sup> de tia arbaro – trioble kompare kun la antaŭa jaro. Pro tiu informo, la prezidento maldungis la estron de INPE, Ricardo Galvaro.

(laŭ „O Globo“, kaj [www.tagesschau.de/ausland/bolsonaro-regenwald-101.html](http://www.tagesschau.de/ausland/bolsonaro-regenwald-101.html) )

Komento de AVE/mw: pluarbaro agas same kiel transportbendo por la humideco de la Atlantiko ĝis al la Anden-montaro. Kiam tiu bendo havas grandajn truojn, ĝi perdas tian funkcion. Krom tio, la humosa tavolo sub la amazonia pluarbaro estas ne tro alta.

--

2019-06 Peticio al UN – malpermesi akaparadon da terenoj - haltigi kaŭzojn por rifughado Koruptaj ŝtataj administrantoj tro ofte donas grandkvantan permeson al gigantaj konzernoj (Arabio, Ĉinio, Indonezio, norda Ameriko, Svisio, k.t.p.) uzi terenojn por monokultura agrikulturo. Tio plej ofte minacas la kamparanojn kiuj loĝhis tie antaŭe, kaj estas forpelataj.

Detruo de la biosfero (arbaroj, ..) kaj krome de la ekzisto-bazo por multaj familioj estas la rezulto. Restas migradi aŭ finfine fughi eksterlanden.

Jen la retejo en pluraj lingvoj, kie eblas subskribi la peticion:

[www.rainforest-rescue.org/petitions/1164/stop-eviction-and-land-grabbing-fight-the-causes-of-flight#letter](http://www.rainforest-rescue.org/petitions/1164/stop-eviction-and-land-grabbing-fight-the-causes-of-flight#letter)

= = =

2019-02-10 Blankaj ursoj kaj al homoj sur Novaja Semlija (rusa insulo en la Arkta Maro) Char la mara glacio mankas, kiun utilas la blankaj ursoj por kapti fokojn, ili devas trovi manghajhon sur solida grundo. Ili ne tro timas la homojn. Ni esperas ke la vokita helpantoj sukcesas montri al ili alternativon, sed ne la paradizon.

[www.tagesschau.de/ausland/eisbaeren-nordpolarmeer-101.html](http://www.tagesschau.de/ausland/eisbaeren-nordpolarmeer-101.html)

Komento AVE/mw: Rusio eksportas grandkvante fosiliajn fuelojn (gason kaj nafton). La bruligo altigas la CO2-koncentrecon en la aero, sekve de tiu altigas la tutmonda temperaturo, kaj degelas pli kaj pli da glacheroj kaj mar-glacio. Ili devus inventi flosojn por la maraj mamuloj (fokoj kaj blankaj ursoj, ktp.) por simuli la naturan viv-terenon. Ligita al tiu afero estas la disputo inter Germanio, la orienteuropaj shtatoj kaj Usono, kiam temas pri la nova duobla rekta gas-dukto inter Rusio kaj Germanio. Usono shatus vendi LNG el Usono.

Ni (germanoj) bezonas pli da ter-gaso por anstataui la karbon, kiu multe pli hejtigas la klimaton (pro malbona efikeco). Kombinitaj varmo-elektro-centraloj estas rapide shangheblaj lau la bezono (char vento kaj suno ne tiom konstante liveras energion), kaj ili uzas la fuelan energion pli bone.

- - -

2019-02-07 EU rezignu pri arbitraciaj kortumoj

La Verduloj en la Europa Parlamento kontrauas arbitraciajnughkortumojn, char tiuj specialaj rajtoj donas troan povon al konzernoj, kaj reduktas la memdecidecon de la parlamentoj kaj registaroj.

Krome la frakcio de Verduloj & Regionalistoj postulas enmeti en internaciajn kontraktojn la UN-Interkonsenton (angle: Binding Treaty) kiu postulas punojn kontrau konzernoj, se tiuj vundigas Homajn Rajtojn.

(lau Sven Giegold, MEP, [www.act.wemove.eu/campaigns/schiedsgerichte-stoppen](http://www.act.wemove.eu/campaigns/schiedsgerichte-stoppen) )

- - -

2019-01-31 Pli bona kontrolo de lobiado en EUropo

EP decidis regulojn pri travidebleco de lobiado. Sven Giegold (MEP, Verduloj/Regionalistoj) havis la funkcion de „raportisto“ - prezenti la proponon.

En Bruselo aktivas multegaj lobiado-organizajhoj. Lobiado de si mem ne estas malbona, sed kashita lobiado kiu tendencas al korupteco. Evidente la kristana-popoldemokratia frakcio ne shatis tiujn regulojn. (lau Sven Giegold, [www.sven-giegold.de](http://www.sven-giegold.de) )

- -

2019-01-29 reciklado de „P“ fosforo el rubo

En Ringsheim, sud-germana lando Baden-Virtemberg, oni komencas instali uzinon kiu ekstraktas fosforon el la cindroj de bruligita rubajho. La landa registaro subtenas tiun novan metodon je kvarono.

Jen la originala informo (en la germana): [www.baden-wuerttemberg.de/de/service/presse/pressemitteilung/pid/75-millionen-euro-fuer-zweckverband-abfallbehandlung-kahlenberg/](http://www.baden-wuerttemberg.de/de/service/presse/pressemitteilung/pid/75-millionen-euro-fuer-zweckverband-abfallbehandlung-kahlenberg/)

En AVENO (Decembro 2018) mi informis jene pri fosforo:

2018-12 Fosforo – eble la estonta „botelkolo“

Chiu organismo bezonas P en formo de fosfato (ADP kaj ATP).

Ghis nun oni konas nur malmultajn lokojn kie ghi estas abunda por ekspluati; sed chiam ni dissipas ghin – forfluigante ghin el niaj necesejoj al la maro, au al deponejo. Do, necesas re-teni P en la biologian cirkuladon de la agrikulturo kaj nutrado.

(Informo lau detala artikolo en la germana de Kerstin Hoppenhaus, Die Zeit, 2018-11-22, p. 34-35)

au serchu en vikipedio: fosfato )

==

Temas pri ekzemplodona - por Esperanto- iniciativo, kie temas pri protekto de praarbaro kaj al ghi ligita lingvo.

Oni povas imagi, ke tiu popolo sen la arbaro distribuighos, sekve de tio la lingvo kaj ties valoraj ekologiaj informoj estos "dis-hakita" kaj mortados.

Eble vi rememoras ke 2011-09 UEA-kvinopo sukcese atingis enmeton de la interrilato "ekologio & indighenaj lingvoj" en dokumenton de UN DPI/NRO-Konferenco.

<http://www.verduloj.org/welcome.htm#aktuale>

---

2019-01-26 Nigerio – Ekuri - Savi arbaron – shanghi straton

La popolo de Ekuri posedas komune arbaron da 33.600 ha, kiu trovighas en la randa zono de "Cross River National Park". Jen la mapo en ilia retejo (en la angla)

<https://www.saveekuriforest.com/>

Jen peto rekte skribi al la prezidento de Nigerio.

<https://www.saveekuriforest.com/petition.html>

Ek de 2016 la registaro de Nigerio volas konstrui autoshoŝejon tra tiu arbaro.

Intertempe oni haltis la faligadon da arboj, sed la plano ankoraŭ ne estis shanghita.

Ekzistus alia vojo.

Sed la plej grava suspekto estas, ke tiu shoseo servus al forhakado de la tuta arbaro.

Pro tio la amikaro por pluvarbaroj daurigas kolekti subskribojn - en pluraj lingvoj:

La forêt ancestrale du peuple Ekuri et ses arbres géants sont menacés par la construction d'une autoroute. Les bulldozers sont là !

<https://www.sauvonslafort.org/petitions/1045/vos-signatures-peuvent-encore-sauver-ces-arbres?mtu=385160708&t=1757>

En la germana - kaj elektebla ankau en aliaj lingvoj:

<https://www.regenwald.org/petitionen/1045/eure-unterschriften-koennen-diese-baeume-noch-retten>

Krome tie eblas malfermi dokumenton en la angla:

<https://www.regenwald.org/petitionen/1045/eure-unterschriften-koennen-diese-baeume-noch-retten#more>

--

2019-01-04 Kudri por edukado

La projekto [www.bonvolo.net](http://www.bonvolo.net) instruas kudradon al virinoj en Goma, DR Kongo.

La komencantoj jam produktas buntajn flagetojn kaj vendas.

La enspezoj ebligas al infanoj, kiuj ne havas monon, viziti lernejon.

Se vi shatas cheson da buntaj flagetoj por via ŝipo au dekori festojn, bonvolu viziti ilin: (en Esperanto kaj en la angla): [www.bonvolo.net](http://www.bonvolo.net) > „butiko“

Aktuala peto de Alphonse kaj Penny:

tiu laborejo provizore troviĝas en la biblioteko ilia lernejo Rutoboko.  
Ili devas konstrui apartan kudrejon, apud la lernejo (do la grundo jam ekzistas).  
Ĉar la enspezo ne sufiĉas por la lernantoj kaj la konstruado, mankas ankoraŭ 600 USD.  
Se vi povas, bonvolu transpagi iom(et)e al la konto de AVE che UEA: avex-z „Kudrejo Goma“  
au al la indikita konto de Alphonse: [www.bonvolo.net/monhelpu](http://www.bonvolo.net/monhelpu)

2019-03-29 BREXIT – jes au ne

AVE proponas al la registaro de Granda Britio rezigni pri BREXIT.

Tio estas la plej simpla solvo por pluraj problemoj kiuj sekvas el Brexit – ĉu regula (laŭ la propono de EU) ĉu brutala (se Britio ne akceptas tiun proponon).

Se Brexit okazos – ĉu restos paco je la limo inter Irlando kaj Norda Irlando (nuntempe parto de Granda Britio).

La perdo ne nur estas je la flanko de Britio, sed ankaŭ afliktus la ekonomion de EU.

Pri gajno dank al Brexit:

- tiuj britoj kiuj volas Brexit havus sian ŝatatan izolecon;
- la EU-anoj eble ne plu devas grumbli ke GB „serĉas la sekvinberojn el la kuko“ - au el la plumpudding.
- Usono kaj Rusio certe ne grumblos pri la malfortigo de EU.

--

2019-01-10 EP por pli forta financa rigardema kontrolo

[Www.sven-giegold.de/parlament-staerkt-europaeische-finanzaufsicht/](http://www.sven-giegold.de/parlament-staerkt-europaeische-finanzaufsicht/)

EP-Komisiono pri ekonomio kaj valutoj (ECON) de la Europa Parlamento decidis kiel reformi la european sistemon de gardado pri financoj, kaj proponos tion al la EU-Komisiono. Inter alie temas pri pli bona sekureco por la uzantoj/konsumantoj de financaj servoj; kaj ankaŭ por pli bone ekscii pri diversaj riskoj. Alia temo estas limigi mon-lavadon kaj korupton.

[Www.sven-giegold.de/parlament-staerkt-europaeische-finanzaufsicht/](http://www.sven-giegold.de/parlament-staerkt-europaeische-finanzaufsicht/)

= =

2019-01-16 EP decidis por pli bonan reguligon pri pesticidoj

Maria Heubuch kaj Bart Staes (frakcio Verduloj kaj Regionalistoj (Greens/EFA) verkis EP-raporton kun la postulo pli bone – favore al la naturo - labori pri la oficiala akcepto de pesticidoj.

La Europa Parlamento voĉdonis pozitive por tiu propono al la EU-Komisiono.

AVENO plurfoje skribis pri Glyphosat / Glifosato kaj aliaj pesticidoj kiuj kaŭzis gravan reduktion da insektoj, ne nur de abeloj; kaj krome endanĝerigas la vivon en la grundo kaj akvaroj, kaj ankaŭ iris en la nutroĉenon de la homoj.

Link, um diese Information auf twitter/facebook zu verbreiten: [www.sven-giegold.de/europaparlament-fordert-grundlegende-reform-der-zulassung-von-pestiziden/](http://www.sven-giegold.de/europaparlament-fordert-grundlegende-reform-der-zulassung-von-pestiziden/)

[www.sven-giegold.de/europaparlament-fordert-grundlegende-reform-der-zulassung-von-pestiziden/](http://www.sven-giegold.de/europaparlament-fordert-grundlegende-reform-der-zulassung-von-pestiziden/)

Jen la ligo (en la germana – kun ligo al sciencaj detaloj (en la angla) ):

[www.maria-heubuch.eu/fileadmin/heubuch/pdf2018/Die\\_Empfehlungen\\_des\\_PEST-Ausschusses\\_auf\\_einen\\_Blick.pdf](http://www.maria-heubuch.eu/fileadmin/heubuch/pdf2018/Die_Empfehlungen_des_PEST-Ausschusses_auf_einen_Blick.pdf)